

Alvoko de la 26a de Aprilo 2021 al virinoj el la tuta mondo

Tiu alvoko sekvas la alvokon de la 26/04/2016 kiu okazigis 400 agoj tra la mondo

Kunteksto

La 26an de Aprilo 1986 komenciĝis kastastrofo de Tĉernobilo (Tchernobyl).

Analizita, komentita kaj filmita de 35 jaroj, tiu unuaranga evento de nia nuntempa historio restas « nesolvita enigmo por la 21a jarcento » anuncis nin Svetlana Aleksieviĉ (Svetlana Alexievitch, Nobel-premio pri literaturo 2015).

Ĝuste ŝia teksto « la petego », eldonita en 1997 en la rusa revuo « Amikeco inter popoloj », kaj de tiam tradukita en multajn lingvojn, permesis konsciigi legantojn el la tuta mondo pri la haladzaj konsekvencoj de tiu teknologia kaj homa katastrofo, sen reiro.

Tragika rakonto regule adaptita al teatro, radio kaj kino, ĝi inspiras multajn fakajn kunvenojn, artikolojn, romanojn, intervjuojn...kaj diskutojn.

El banala amhistorio, la prologo de *La petego* kondukas nin en la koro de teknologia ruiniĝo, sen antaŭo en la homara historio.

La simpla atesto de tutjuna virino parolanta pri ŝia fajrestingista edzo iĝas same kiel epopeo.

Gardisto ĉi-tiun nokton, ŝia edzo kun dekkvar kolegoj vane agis por estingi tiun tiel dirita « ordinaran fajron » sur la reaktoro numero 4 de la Centralo Lenino. (Lénine).

Traradiita ekde la unuaj minutoj, lia agonio daŭris dekkvar tagojn, kore de malracio kaj teruriĝo... kaj de freneza amo. Dekkvar halucinaj tagoj, kiuj difektegis lin kaj lian edzinon, iliajn familiojn, iliajn amikojn, sed ankaŭ Medicinon, Sciencon, politikan Povon kaj armean Povon.

En Sovetunio kaj ankaŭ en la cetera mondo.



Tiu « Himno al amo » estas kantinda de giganta virinĥoro ĉie sur la Tero.

Ĉu vi ŝatas legi laŭtevoĉe ? Ĉu vi estas aktoro, aŭ ne ? Do, ie ajn en la mondo vi estos la 25an kaj 26an de Aprilo 2021 kaj je la horo kiun vi decidis (de la 18a la 25an ĝis noktomezo la 26an) **legu aŭ ludu la Prologo de La petego de Svetlana Aleksieviĉ.**

Listo de eldonoj kaj tradukoj el la tuta mondo sur :

<https://april26appeal.noblogs.org>



Ĉi-tiu arta efemera ago celas publikon invitita senpage ĉu en librejo, ruino, apartamento, teatro, biblioteko, publika ĝardeno, lerneĵĉambro, eksa uzino, meze de arbaro, supre de monto, en korto, trinkejo, parkejo, malliberujo, kuracejo...

- de la 25a je la 18a ĝis la 26a je noktomezo
- legado aŭ prezentado nur de la Prologo
- simpleco de interpretado
- senpaga evento
- nenia kapto, krom unu foto

Laŭ tiuj supraj striktaj kondicioj, Svetlana Aleksieviĉ permesas kaj subtenas tiun agoprojekton.

Jam nun vi povas anunci vian partoprenon sur la fejsbukan grupon <https://www.facebook.com/groups/977646358962204/>

Enskribu vian nomon, la lokon (adreso kaj lando) kaj la horon de la evento.

Laŭ via deziro, aldonu portretofoton de vi aŭ foton de la loko, emajlon, retejon, telefonnumeron.

Vi respondecas pri la evento. Ĝia ellaborigo devas esti simpla kaj malmultekosta. Vi zorgas pri la reklamo, simple precizante ke vi respondas la alvokon de la 26a de Aprilo 2021.

La fejsbuka grupo kaj la blogo de ALVOKO DE LA 26A DE APRILO 2021 indeksas la tutajn proponojn laŭ kiam ili alvenas. Ili estas inform- kaj komunikad-spacoj por ĵurnalistoj el la tuta mondo kaj por iu ajn kiu volas informiĝi.

Korespondaĵo eblas kun la skipo de la ALVOKO DE LA 21A APRILO 2021

per la franca lingvo kun Bruno Boussagnol cokoller@bluewin.ch

per la angla lingvo kun André Larivière andre.lariviere@laposte.net

per la japana lingvo kun Yumi Célia yumi.celia@gmail.com

per la rusa lingvo kaj per la ukraina lingvo kun Nika La Dantec artnouveau@gmail.com